ESPERANTO EN LA SCIENCO

de Prof. d-ro Maurice FRÉCHET

Mi legis, kun granda interesiĝo, artikolon publikigitan sub la sama titolo kiel ĉi-supre en la revuo „Esperanto" (N-ro 631, Junio 1958, p. 94—95). Mi konsentas ĝenerale kun la aŭtoro, S-ro Makkink. Mi volus tamen kompletigi lian raporton pri iu punkto. Makkink prave insistas ke la esperantistaj serĉistoj publikigu siajn verkojn en Esperanto. Estas farindaj tamen kelkaj rezervoj kaj aliflanke oni povas uzi aliajn rimedojn por penetrigi Esperanton en la sciencan mondon.

Oni povas unue observi ke, klopodante publikigi siajn memuarojn en Esperanto, serĉisto riskas prokrasti multe ilian publikigadon. Li devas skribi en lingvo, facila certe, sed kelkfoje malpli facila por li ol lia nacia lingvo. Pli granda malfacilaĵo: li devas trovi redaktoron de scienca periodaĵo samfaka, kiu akceptas publikigi artikolon en Esperanto. Kiam tio estas atingita, venos la malfacilaĵoj pure tipografiaj — do novaj prokrastoj — jam signalitaj de Makkink.

Tiu tempo tiel perdita por la serĉisto estas ankaŭ perdita por la scienco. Krome, ĉiu prokrasto en la publikigado de memuaro minacas ĉi tiun per senvaloriĝo pro pli frua publikiĝo de memuaro samtema poste de alia serĉisto skribita en nacia lingvo.

Fine, kio povas ludi la plej grandan rolon en la decido de la serĉisto: tiu ĉi scias ke en la nuna stato de la aferoj, memuaro en Esperanto eĉ tre bona trovos malpli da legantoj ol memuaro skribita en la lingvoj ĝenerale akceptataj en kongresoj aŭ periodaĵoj. Se la leganto klopodas serioze kompreni sciencan tekston en Esperanto, li povos ofte sukcesi aŭ almenaŭ atingi la ĝeneralan sencon. Sed tre ofte, leginte la titolon aŭ la unuan linion, li ne daŭrigos, kaj turnos la paĝon [1]).

Oni do ne povas rekomendi absolute al ĉiu scienca serĉisto la publikigadon de ĉiuj siaj memuaroj en Esperanto. Li mem devos decidi ĉu li povos publikigi sian artikolon sen malutila prokrasto en konvena periodaĵo, ĉu li konas sufiĉe la lingvon kaj la teknikajn terminojn de sia fako en Esperanto por facile redakti rekte en Esperanto, k.t.p. Por doni ekzemplon, mi publikigis lastatempe plurajn memuarojn en Esperanto por kiuj la unua kondiĉo estis plenumata; sed mi estus bezoninta tre grandan streĉon por skribi ilin rekte en Esperanto. Mi havis la bonan fortunon koni du serĉistojn (scipovantajn ĝisfunde la lingvon internacian kaj ĝian matematikan terminologion) kiuj konsentis traduki miajn francajn tekstojn. Mi kredas, ke kazoj kiel nia ne estas maloftaj, kaj ke estus tial tre necese trovi laŭeble multajn sciencistojn kiuj povus traduki senerare en Esperanton sciencajn tekstojn kaj kiuj konsentus tion fari.

Tio ĉi kondukas min al rimarko ankoraŭ pli grava. Kiel observas Makkink, la nombro de la esperantistaj serĉistoj estas malgranda en ĉiu fako. Se ĉiuj sekvus liajn konsilojn (kaj kiel dirite tio ŝajnas al mi iom malprobabla) la rezulto estus tamen ke la proporcio de la artikoloj publikigitaj en Esperanto en sciencaj revuoj restus tre malgranda. Aliparte ĉar la genio (aŭ eĉ simple la talento) estas funkcio de la nombro, estas malprobable ke inter tiuj sciencaj artikoloj publikigitaj de esperantistoj, troviĝas multaj tre grandvaloraj. Nu, nuntempe la scienca produktaĵo estas tiel granda en ĉiuj fakoj ke estas preskaŭ neeble por serĉisto ĉion legi, eĉ nur en sia fako. Li legos prefere la plej bonajn artikolojn, t.e. li neglektos grandan proporcion de la artikoloj skribitaj en Esperanto, kiuj estas jam malmultaj. Por rebonigi la situacion, estas do necese uzi samtempe aliajn metodojn kaj ekz. rimedon kiun mi jam signalis. Inter la plej konataj sciencistoj ne malofte troviĝas homoj kiuj jam aŭdis pri Esperanto, kiuj pensas ke la ĝenerala uzado de tiu lingvo estus tre utila, kaj kiuj estas kapablaj kompreni tekston en Esperanto sen antaŭa lernado. Sed unu afero estas legi, alia skribi, kaj la plimulto ne prenis la tempon — kaj ne intencas deturniĝi de siaj verkoj por preni la tempon — por studi Esperanton kun ĝia scienca terminologio sufiĉe ĝisfunde por skribi rekte kaj sen troa peno en tiu lingvo. Sed pluraj akceptus ke unu el iliaj memuaroj estu tradukota en Esperanton kaj estu publikigota antaŭ la memuaro en nacia lingvo aŭ eĉ (kio estus ankoraŭ pli bona) nur en Esperanto.

La serĉistoj kiuj scius ke grava memuaro ekzistas nur en Esperanto rapide klopodus ĝin legi. La plimulto sukcesus sen antaŭa lernado de tiu lingvo. Tio estus por ili, krom la scienca profito, la eltrovo de la facileco de Esperanto kaj por kelkaj tio elvokus la deziron lerni sufiĉe tiun lingvon por plene kompreni la tekston kaj ne nur la ĝeneralan sencon.

Sed tie ankaŭ prezentiĝas la neceso trovi sciencistojn bone scipovantajn Esperanton, pretajn por traduki sciencajn tekstojn en Esperanton kaj eĉ por proponi siajn servojn al la sciencistoj, la plej eminentaj unuaj, kiel ekz. la Nobel-premiitoj. Tiuj ĉi siavice kun sia sufiĉa aŭtoritato povos multe pli facile igi periodaĵan redaktoron akcepti ke iliaj memuaroj estu publikigotaj en Esperanto.

Krom la rektaj avantaĝoj el tio rezultantaj, ili estos kreintaj precedencon kiu ebligos poste la akceptadon de memuaroj en Esperanto skribitaj de serĉistoj valoraj, sed ne tiel universale konataj.

[1]) Oni devas noti ke tiuj rimarkoj estas malpli gravaj por serĉistoj kies propra lingvo estas malmulte aŭ tute ne uzata en internaciaj periodaĵoj aŭ en kongresoj. Por tiuj ĉi la legantoj de memuaroj en Esperanto estos — se ne pli multaj — almenaŭ tiel multaj kiel por memuaroj en ilia nacia lingvo.